

LIBRO-PRESADO LAŬ ĈIUJ MANIEROJ
KAJ EN ĈIUJ LINGVOJ

KOLORPRESOJ
ILUSTRITAJ
KATALOGOJ
PROSPEKTOJ

LERNOLIBROJ
OBLIGACIOJ-
FORMULAROJ
AKCIAJ



PRESEJO KAJ ARTOMETIEJO
J. B. HIRSCHFELD

A. PRIES
LEIPZIG
BRÜDERSTRASSE 59

STEREOTIPIO K. GALVANOPLASTIKO • ĈIRK. 50 PRESMAŜINOJ
PROpra KLIŜO-METIEJO • GRANDA DESEgNO-LABOREJO

★

★

La dek devoj de l'Esperantisto:

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu; vi fundamenton sekvu kaj fidela restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne eserojn.

5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵo ne faru regulon, kaj el regulo ne faru malgravaĵon.

6. Verkante en Esperanto, ne kredu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron; ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu: Esperanton parolu.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa: senlace varbu por UEA.

9. Legugaz eton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.

★

★